La Amsterdama rondo

Karaj partoprenantoj de la kunvenoj de la Amsterdama Rondo,

Nun multaj jam scias, ke La Amsterdama Rondo iniciatis la "Projekton Baantjer": la tradukon kaj distribuon (tutmonde) de la libreto de Baantjer (n-ro 70) **"De Cock kaj la murdo en preĝo"**. **Vidu ĉi kune por vasta resumo de la rakonto.**

La interkonsento kun la eldonisto De Fontein estas aranĝita. Dum la venontaj kvin jaroj ni rajtas ciferece distribui la plej novan libreton.
Ni elektis libron de Baantjer ĉar la policaj rakontoj de De Cock okazas en la koro de Amsterdamo.

La policisto kaj verkisto Baantjer laboris ĉe la (jam de jaroj fermita) oficejo Warmoesstraat, en la sama strato kie ni kutime kunvenas ĉiumonate en la hotelo De Koopermoolen. En la Warmoesstrato ankaŭ **estas la Baantjer-Muzeo**.
Ni pensas, ke oni kun intereso akceptos la libron.


BAANTJER
De Cock
en de dood in gebed
Fontein

Baantjer
Museum

En la PDF-formato La libreto ampleksas ĉirkaŭ 125 paĝojn tradukendajn, en 15 ĉapitroj. La lingvaĵo estas simpla. La libro havas entute 145 paĝojn.

Kiel diskutite, ni prizorgos la tradukadon kun kelkaj homoj. Fina redaktado ĉe Federico Gobbo (IT/NL) kaj Betty Maul (DE)
La intenco do estas cifere eldoni la libreton **kiel felietonon.** Ekzemple unufoje semajne aŭ monate?
Ni povus konsideri pliriĉigi la eldonaĵojn per fojaj foto aŭ klarigo de tipaj amsterdamaj / nederlandaj detaloj.

Kiom da tradukantoj?
Ni esperas ke multaj homoj partoprenos. Ekzemple en teamoj de du personoj kiuj kune tradukos parton de la libro.
Se estos ses homoj, tio signifus po teamo 15/3 = 5 ĉapitroj de po ĉirkaŭ 9 paĝoj. Entute ĉirkaŭ 45 paĝoj. **Ĉi kune vi trovos la unuan ĉapitron en la nederlanda.**
La tradukantoj ricevos la libreton en PDF-formato. Peter decidos pri tio kiuj traduku kiun ĉapitron kaj interkonsentos kun vi pri kiam vi liveros la tradukitan ĉapitron.

Se vi ŝatus partopreni en ĉi tiu traduka aventuro, bonvolu sendu retmesaĝon al **Peter Ebenau** , aŭ telefone 06-1424 0870. Prefere antaŭ sabato,la 27a de marto.